

La libro de la semajno



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

L. L. Zamenhof

Proverbaro
Esperanta
2a eldono 9 GM

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 33/1974 - 17 sep 1974
Aperas ĉiusemajne

Impresoj el Pollando

Raportas d-ro Werner Bormann

Varsovio. La direktoro de la Eksterlanda Servo de Pola Radio, s-ro Witold Skrabalak, invitis la en Varsovio restadantan vic-prezidanton de UEA, d-ro Werner Bormann, al interparolado pri la Esperanto-dissendoj de sia radiostacio. La 3-an de septembro 1974 ili, sinjoroj Pettyn kaj Klimek, kaj sinjorino Elsbeth Bormann dum pli ol du horoj diskutis pri la akcepto de la dissendoj el Varsovio de la esperantista publiko. La vicprezidanto de UEA klarigis, kiom ŝatata estas Pola Radio kiel informilo en la Esperanto-movado, kaj ke tio estis ĵus agnoskita de la estraro de UEA, kiu metis la radiostacion inter la nur kelkaj ricevantoj de siaj rapidinformoj. La direktoro de la Eksterlanda Servo substrekis la gravecon por li de informado pri Polio kaj pri la pola vidpunkto al mondaj aferoj. El ambaŭ opinioj evoluis interesoplena diskuto tuŝanta ankaŭ politikajn temojn.

Poste la direktoro bonvolis inviti siajn gastojn al abunda vespermanĝo en la Varsovia hotelo "Polonia".

Szczecin. Antaŭ 50 esperantistoj kaj gastoj prelegis pri la aktuala laboro de UEA ties vicprezidanto, d-ro Werner Bormann, la 31-an de aŭgusto 1974, en Szczecin en la Kafejo Esperanto. Tiu kafejo troviĝas apud grava strato norden, tra kiu veturas tramo, en alta domo kun vendejoj en la teretaĝo, sed la kafejo en la unua etaĝo, tiel ke la grandaj surskriboj "Esperanto" estas vaste videblaj.

La germana gasto esprimis sian admiron al la polaj esperantistoj, ke ili sukcesis doni al bone vizitata restoracio tian por ni allogan nomon.

Varsovio. En Varsovio en la sidejo de Pola Esperanto-Asocio okazis kelkaj interparoloj inter estraranoj de tiu landa asocio, ĉefe ĝia prezidanto, St. Świstak, kaj la estrarano de UEA por landaj asocioj, vicprezidanto d-ro Bormann. Li informiĝis pri la stato de la movado en Pollando. La ideinterŝanĝo servas al plibonigo de la laboroj por la komuna afero. Tial la estraro de UEA decidis, ke tiaj interparoladoj de UEA-estraranoj kun gvidantoj de landaj asocioj okazu plej-eble ofte.

Miedzygórze. La 5-an de septembro 1974 komenciĝis la esperantista feriado "La Ora Aŭtuno" en Miedzygórze (prononcu Miendziguĝe). Partoprenas 350 esperantistoj, inter ili 40 ne-poloj, ĉefe ĉeĥo-slovakoj kaj orĝentgermanoj, kaj nur kelkaj gastoj el okcidentaj landoj. Ĉi-jare tiu feriado jubileas, ĉar ĝi okazas la 10-an fojon; multaj vizitantoj ĉeestas jam ripetitan fojon. La ĉirkaŭanta naturo estas belega, la feriejo - posedata de la pola sindikato - taŭga, sed bedaŭrinde ne sufiĉe granda por la tre multaj esperantistoj, kiujn ĝi altiris. Antaŭtagmeze okazas kursoj por komencantoj (da kiuj estas multaj) kaj progresintoj, posttagmeze ekskursoj ĉu piede al proksimaj montopintoj ĉu aŭtobuse, kaj vespere programeroj distraj. Por pliintensigi la kontaktojn inter esperantistoj estus dezirinde, ke multaj ne-polaj esperantistoj aliĝu al tiu bela feriado.

La signifo de Varsovio por esperantistoj

Varsovio (pp) En intervjuo kun Andrzej Pettyn por la Esperanto-Redakcio de Pola Radio D-ro Werner Bormann diris pri la signifo de Varsovio por esperantistoj okaze de lia vizito jenon:

"Ni vizitis multajn vidindaĵojn malgraŭ la mallonga tempo sed per ni kiel esperantistoj ja Varsovio havas treege specialan signifon kiel tiu urbo ne havas por aliaj homoj. Estas certaj memoraĵoj pri Zamenhof kaj pri lia familio. Ni do estis sur la tombejo, ni vidis lian tombon, ni poste estis en la strato Zamenhof ĉe la domo, kaj ĉar ni bone memoris ke tiu strato havis la nomon Dzika ni eĉ estis en la parto de la strato kiu ankoraŭ konservis sian originan nomon. Ni vidis tie la terurajn detruojn de la milita tempo, la tri arbojn starantajn kiel lasta memoraĵo de la antaŭa geto. Ni ankaŭ vidis la monumentojn kiuj memorigas pri vere tragika periodo en la evoluo de tiu ĉi urbo."

Salutoj al la PP-legantoj

Ges-roj Bormann sendis salutojn al ĉiuj legantoj de Pilo-Press el sia feria restado en Pollando. - En PP n-ro 29/1974 ni sciigis, ke ges-roj Bormann vojaĝos al Pollando laŭ invito de Pola Esperanto-Asocio. Ni precizigas tiun informon tiele, ke la invito de PEA ri-latis la vizon, sed veturon kaj restadon ges-roj Bormann pagis mem.

+++++

Esperanto ankaŭ en la etero

Hamburgo (DJ 4 PG) Estis merito de la du radio-amatoroj Ludwig Schmieler, D-6110 Dieburg, kaj Hans-B. Welling, D-4005 Meerbusch-2-Osterath, ke dum la 59a Universala Kongreso de Esperanto 1974 en Hamburgo funkciis kongresa radio-amatora stacio.

Voksigno estis DK Ø EW (germane: Esperanto-Weltkongress). Ĉirkaŭ 40 E-radio-amatoroj estis informitaj per cirkulero antaŭ la kongreso. Konstrui propran antenon ne estis necese, ĉar la Hamburga radio-klubo disponigis sian ejon kaj la antenon por la Esperanto-stacio DK Ø EW. La radio-amatora stacio funkciis de la 29a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1974. Dank' al la Hamburga radio-klubo (DL Ø EH) povis prepari kaj funkciigi la Esperanto-radio-amatoran stacion la samideanoj Ludwig DL 8 XH, Rudolf Ruemer DL 2 ZO (el 239 Flensburg) kaj Hans DJ 4 PG.

La Esperanto-kontaktoj per etero estis bonaj kaj partoprenis tre multe da radio-amatoroj el la tuta Eŭropo kaj ankaŭ el transmaraj landoj. Helpe de s-ano Peter Schaefer (DJ 8 NO) el D-2000 Hamburg, faris intervjuojn la germanaj radio-stacioj NDR (FM) kaj la "Deutsche Welle" el D-5000 Köln. Dum la alveno de la ĵurnalisto Rami (4X 4 LX) respondis multaj Esperanto-radio-amatoroj kaj tio pruvis, ke ekzistas vigla Esperanto-kontakto ankaŭ en la etero.

ILERA (Internacia Ligo de Esperanto-Radio-Amatoroj) kunsidis la 30an de julio 1974. XE 1 M proponis, ke ĉiuj E-amatoroj uzu konfirm-kartojn en Esperanto, kiel propagandilon por ILERA kaj Esperanto. Alia propono: kondiĉo por ebligi pli multajn kontaktojn, estas unusola standard-frekvenco por Esperanto-kontaktoj en ĉiu bendo, do - "Por Internacia Lingvo - Internacia Frekvenco".

Citaĵo pri citaĵo

Mencio de s-ano Bruno Gahler estas tre trafa! S-ro Piloczinski!!!

D-ro J. Kondor

Esperanto en la lernejojn

Publika letero al la Eŭropa Esperantistaro

Schoorl (NL) Eŭropa Esperanto Centro dissendis ĵus jenan publikan leteron al la Eŭropaj esperantistoj:

"Tiu sloganon (Esperanto en la lernejojn!) ni jam aŭdas dum pluraj jardekoj, ĝi estiĝis ne pli ol slogano. Ĉu ĉiuj geesperantistoj vere deziras la enkondukon de Esperanto en la lernejojn? Ĉu ili ekzemple estas pretaj elspezi monon por ebligi tiun enkondukon en lernejojn en Eŭropo? Ŝajne ne! Ŝajne ili ne komprenas ke agado necesas por atingi ion! Dum pluraj jaroj la Eŭropa Esperanto Centro (EEC) agis kune kun la Internacia Ligo de Esperanto Instruistoj (ILEI) en la kadro de la Eŭropa Instruista Unuiĝo (EIU) kaj la Eŭropa Kulturcentro (EK) en Genevo (ambaŭ ne-esperantistaj institucioj) por konvinki ilin pri la valoro kaj neceso de Esperanto.

La plej grava pozitiva rezulto el tiu agado estas ke EK eldonas sian bultenon por Eŭropocivitisma Edukado "Eŭropa Dokumentaro" ankaŭ en Esperanto. (Antaŭe nur en angla kaj franca lingvoj!) Ĝi pritraktas interesajn temojn pri la evoluo de Eŭropo kaj ĝiaj popoloj. Por garanti la eldonadon necesas 500 abonantoj je la 1a de januaro 1975. HONTINDA FAKTO estas ke je la 1-a de septembro 1974 nur estis 268 abonantoj en Eŭropo kaj 10 ekster la kontinento.

KIAL tiu ABONO estas TIEL GRAVA???

ILEI startos lingvajn eksperimentojn en lernejoj en pliaj regionoj de Eŭropo. EIU kaj EK multe povas helpi en tiu kampanjo per subteno kaj subvencio. Ilia kunlaboro estas nepre necesega. SED, ne jam ekzistas 500 geesperantistoj kiuj interesiĝas pri la instruado en Eŭropo nek pri la instruado de Esperanto. KIEL ni povos atendi ke la Eŭropaj instancoj interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn?? La Nederlanda sekcio de ILEI sendis gravajn proponojn al la edukministro. La sekcio de Belgio, Britio, Danio, Germanio kaj Italio agas same. Ĉiuj proponoj estos senvaloraj se EK malkonsilos la akcepton al la Konsilio de Edukministroj. La estraro de EK estas favora al Esperanto, ĝi tute komprenas bone la neceson de internacia lingvo. SED, ĝi povas nur agi se la esperantistoj mem deziras montri sian intereson kaj aktivecon pri la instruado de la lingvo.

"Esperanto en la lernejojn" ne plu estu slogano, ĝi fariĝu realeco. Vi elspezu 9 sv. Frankojn por abono ĉiujara, de Eŭropa Dokumentaro, ĝi aperas kvarfoje. Tiel vi helpas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Sendu TUJ leterkarton kun via abonmendo al Eŭropa Esperanto Centro, NL-1719 Schoorl."

Noto: La eldonajon "Eŭropa Dokumentaro" oni povas mendii ankaŭ ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, prezo 8,- DM.

Germana Esperanto-Kongreso 1975

Ĵus aperis la dukoloraj glumarkoj sub la solgano ESPERANTO-TURISMO Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113 PSchK Nürnberg 819 56-851. Prezoj inkl. afranko: 1 folio kun 10 glumarkoj 1,- DM; 5 folioj 3,50 DM; 10 folioj 5,50 DM.

60a Universala Kongreso de Esperanto 1975

Aldone vi trovas aliĝilon por la venontjara UK en Kopenhago. Peranto por FRG estas Ludwig Pickel, 85 Nürnberg. Al li oni sendu la aliĝilon kaj la koncernan pagon. Vidu PP n-ro 32/74 p.2

Aplaŭdinda iniciato

Varsovio (pp) En unu el la lasttempaj Esperanto-anguletoj en la kadro de la Germanlingva programo de Pola Radio (dیمانډe je la 22a horo sur ondolongoj 31 m, 41 m, 49 m) Mariusz Dastych prezentis la n-ron 30/74 de Pilo-Press kaj la iniciaton de Libroservo Ludwig Pickel pri la Internacia Rondo "Amikoj de la Esperanta literaturo kaj kulturo".

Pri tiu Internacia Rondo Mariusz Dastych i.a. komentis: "Al tiu ĉi iniciato oni povas nur aplaŭdi. Efektive, la esperantistoj ne estas leganta popolo. Tiu ĉi situacio devas ŝanĝiĝi se oni kredas je estonta progreso de la internacia lingvo en la kleraj medioj. Sed laŭ nia opinio la eldonado de libroj en Esperanto devas esti anticipataj laŭ la sondado en la merkato de la legantoj. Oni samtempe konstatas, ke multaj libroj aperis senutile kaj nur pligrandigas la stokon. Ŝajnas ke la esperantista publiko plue atendas je libroj valoraj kaj samtempe facile legeblaj...kaj instruaj. Oni ne povas simple imiti la grandajn nacilingvajn eldonejojn sed provi ne nur eldoni tiujn verkojn kiuj estas popularaj kaj samtempe kontribuas al reciproka aprezo de la diversnaciaj kulturaj valoroj. Fine la libroj eldonataj en Esperanto ne povas esti pli multekostaj ol la popularaj libroj en naciaj lingvoj. La vojo al la redukto de la kosto estas pli grandaj eldonkvantoj kaj pro tio necesas novajn legantojn trovi ankaŭ en la maniero kiun proponas nia populara Nürnberga eldonisto Ludwig Pickel."

Salutoj de vojaĝanta esperantisto

Bamako, Malio (pp) Adalbert Masuhr, Elmshorn, nuntempe vojaĝas en Afriko kaj estos en januaro 1975 en Novzelando. El Bamako, la ĉefurbo de Malio, li skribis i.a.: Mi loĝas ĉe amiko de UEA-delegito en la centro de Bamako malmultekoste, ĉar la UEA-delegito loĝas 10 km for de la centro. (Delegito estas Ibrahim-Sori Tamboura, profesoro pri tekniko, bone konata en kelkaj eŭropaj landoj, kie li antaŭ jaroj partoprenis aktive en diversaj E-arangoj, i.a. ankaŭ en Nürnberg kaj Fürth) Estas bone se oni parolas tie same kiel en Tunesio la francan lingvon, en Tunesio preskaŭ neniu parolas la anglan, kelkaj homoj iomete la germanan. Por bone solvi la lingvo-problemon oni bezonas la anglan, francan kaj hispanan lingvojn... Estus bone se Esperanto estus la dua lingvo sed tio nur restos la sono de la homaro."

Esperanto en la radio

Radio Vieno volas surprizi skribemajn aŭskultantojn. Ĉiu aŭskultanto ricevas senpage la diskon "El Esperantujo" kun recitaĵoj de Philipp Zeska, kiuj skribis 4foje al la stacio. Do valoras aŭskulti la interesajn ĉiusemajnajn aktualajn komentariojn kaj raportojn. Aŭskultu kaj skribu al Esperanto-Redakcio de ORF, P.O.Box 700, A-1041 Vieno. Berno startis i.a. novan prelegserion pri la konsekvencoj de la mal-koloniigo kaj ĝiaj ŝanĝoj en industriaj landoj. Varsovio klopodas per diversaj rimedoj allogi pliajn aŭskultantojn. La Varsovia redakcio devas solvi la dilemon inter sia origina tasko, la informado pri Pollando kaj pri la pola vidpunkto al mondaj aferoj kaj la deziroj de multaj esperantistoj, kiuj fakte nur interesiĝas pri Esperantaj temoj. Ŝajnas al mi, ke la sinteno de tiuj esperantistoj nepre devas ŝanĝiĝi, se la ĉiutagaj tri Esperanto-elsendoj el Varsovio ankaŭ estonte estu certigitaj. La Esperanto-elsendoj ne povas nur sin okupi pri movadaj aferoj, sed devas esti la normala programo kiel ankaŭ de aliaj fremdlingvaj elsendoj de Pola Radio. La Esperanto-temoj povas esti nur aldonaj!